FORUMO n–ro 143
(2-3 / 2009)
Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

# "THE TIMES" raportas pri LSG



*Estraranoj informas pri kaj varbas por LSG dum Movada Foiro en Bialistoko* *fotis: Dan*

## Enhavo:

Protokolo de la ĝenerala kunveno de LSG dum la 94a UK en Bjalistoko 3
LSG en Kongresa Kuriero: LSG 30-jariĝos 3
"THE TIMES" raportas pri LSG 4
Alan Turing: brila matematikisto kaj samseksemulo 5
Gej-edziĝo en Hindio plu problemas 6
En Britio lesbaninoj rajtas gepatroj 6
Urugvajo avangarda en la GLAT-rajtoj 7
Italia homofobio kreskas (?) 8
Foto pri geja vivokazo gajnas en la World Press Photo 9
Noticoj – mallonge 12

L S G

**Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj**

| | |
|---|---|
| interretejo: | http://lsg-esperanto.org |
| adreso: | la sekretario (vidu sube) |
| membriĝo: | ĉe la sekretario |
| kotizoj: | 12 EUR por 1 jaro |
| | 30 EUR por 3 jaroj |

**Estraro**

Prezidanto

Francis [fsoghomonian at yahoo.fr]

Sekretario

Rolf [lasekretario at gmx.net]

kaj kasisto

Rolf [lakasisto at gmx.net]

Estraranoj

Arnold [arvimide at earthlink.net]

Paul Harry [phsb at orange.net]

Retprizorganto

Randy [randy.dean at pobox.com]

**FORUMO 143**

**Membrogazeto de la LSG (2-3/ 2009)**

adreso: la sekretario (vidu supre)

redakcio: [laredaktanto at gmx.net]

Maŭro, Italio

Juanjo, Hispanio

interreta versio: La gazeto aperas ankaŭ interrete kiel PDF-dosiero (vidu interretejo) Por via integro, ĉiuj eventualaj familiaj nomoj kaj adresoj estas forigataj en la interreta versio.

ekspedo la sekretario (vidu supre)

! *Nepre **ne** kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto. La persono **ne** estas ligano. Nur pro la favoraj poŝt-tarifoj ni forsendas la gazeton el Ĉeĥio*

**Limdato por FORUMO 144:** 2010-03-31

# El la redakcio

Karaj legantoj,

Redaktado de bulteno, kaj de ĉia ajn revu(et)o estas interesa kaj kreiva laboro, tamen temporaba. Kiam mi akceptis la defion – pro ekmanko de alia redaktoro – mi tion faris entuziasme kaj respondece, konvinkita ke nia asocio ja bezonas organon. Forumo apenaŭ plenumas tiun rolon, ĉar informoj pri la internaj aferoj de la asocio malofte aperas, kaj ni precipe kolektas novaĵojn trafeblaj en interreto. Ĝi, do, estas *revuo*, laŭ la origina franclingva signifo "revidita", refoje legeblaj aferoj. "Revuo" pri gejaj kaj lesbanaj aferoj, kiu estas de jaroj la sola ekzistanta en la mondo pri tiuj temoj, en Esperanto. Do, indas rezisti kaj pluiri, ĉu ne? Juanjo multe helpas en la trovado de artikoloj kaj fotoj / bildoj, sed la traduka laboro estas impona, kaj certe mi, italo, ne kapablas rapide traduki el lingvoj fremdaj al mi, en kiuj tamen estas verkitaj multaj troveblaj artikoloj. En la lastaj numeroj valoran helpon ni havis en la kunlaboro de Paweł Fischer-Kotowski, kiun mi ŝatas ĉi tie kore danki, kies kontribuo estas valora ne nur por la bulteno, sed ankaŭ ĝenerale en la asocio.

*Maŭro*

**Kontribuoj por FORUMO kiel informoj, bildoj kaj artikoloj estas ĉiam bonvenaj**

*Vi bonvolu kompreni …*

*… ke nur libere uzeblaj kontribuoj povas esti akceptataj*

*… ke estas neniu garantio, ke alsenditaj kontribuoj estos publikigitaj*

*… kaj ke materialo nur en esceptaj kazoj povas esti resendita al vi.*

*Ni konservas al ni la rajton redakcie ŝanĝi kontribuojn.*

*Nesubskribitaj artikoloj estas de la redakcio.*

## Protokolo de la ĝenerala kunveno de LSG dum la 94a UK en Bjalistoko

1. La tagordo estis akceptita sen ŝanĝoj. Ĉar oni ne sukcesis trovi gejan asocion viziteblan en Bjalistoko, Sebastian (650) faris la proponon, ke li provos trovi gejon per la reta komunumo “Gayromeo”.

2. Protokolisto: Kiel protokolisto sin proponis kaj estis akceptita Sebastian (650).

3. Kiel raportistoj por la UK-kuriero estis akceptitaj Rolf (188) kaj Sebastian (650).

4. La protokolo de la lasta kunveno en Roterdamo estis akceptita.

5. La kasisto Rolf (188) donis aktualan financan raporton de la ligo. Kvankam la financa situacio de LSG plue estas stabile li proponis, la ekde 10 jarojn stabilan membrokotizon adapti al la intertempa inflacio. La unujara kotizo estu 12 €, la 3-jara kotizo estu 30 €. La raporto kaj la propono per voĉdono estis akceptita unuanime kun unu sindeteno. La kasan raporton ricevos la geliganoj komune kun Forumo 1/2010.

6. Landaj raportoj: Neniuj

7. Ĝenerala agado kaj estonteco de LSG: <u>Propono 1</u>: Fari enketon inter la kongresontoj por mezuri la toleremon de la Esperantistoj. <u>Propono 2</u>: Havi rilaton kun ILGA

8. Estis pritraktita sub punkto 5.

9. La elektoj pri jenaj estraranoj estis unuanime:

Prezidanto: Francis (297)
Sekretario kaj Kasisto: Rolf (188)
Retprizorganto: Randy (587)
Estrarano pri varbado: Sebastian (650)
Kromaj membroj de la estraro: Arnold (264) kaj Paul Harry (504)

10. Rezolucioj ne estas.

11. Starado por forpasintaj LSG-anoj.

12. Sekvonta ĝenerala kunveno okazos dum la UK en Kopenhago 2011. La kunsido estis fermita.

## LSG en Kongresa Kuriero: LSG 30-jariĝos

Kelkajn tagojn antaŭ sia 30-jariĝo LSG, la ligo de samseksemaj geesperantistoj, kunvenis dimanĉon por sia ĝenerala jarkunveno dum la UK.

Nia kunveno komenciĝis iom malfrue, ĉar estraranoj estis intervjuita far ĵurnalistoj de brita gazeto „The Times“; la artikolo aperis 27-an de julio kaj estas ankaŭ rete atingebla (http://tiny.cc/RjBs8).

Ni mallonge resumis la pasintajn jardekojn kaj priparolis niajn estontajn agadojn.

La kasisto donis raporton pri la lasta periodo kaj faris proponon pri la ŝanĝo de la membrokotizoj. Ambaŭ aferoj estis akceptitaj de la jarkunveno. La malnova estraro estis malŝarĝita kaj reelektita de la jarkunveno.

Krome ni elektis Sebastian kiel estraranon por varbado. Estonte ni volas klopodi revigligi niajn iamajn kontaktojn al ILGA (International Lesbian and Gay Association). Fine ni decidis, ke nia venonta kunveno okazu dum la UK 2011.

*Rolf (188) kaj Sebastian (650)*

# "THE TIMES" raportas pri LSG

Ankaŭ dum la lasta UK nia ligo estis bone videbla. Dum la interkona vespero LSG havis tablon en la movada foiro. En la programo la kongresanoj trovis nian ĝeneralan jarkunvenon kaj ni havis bone videblan duontagan informtablon en la teretaĝo de la kongresejo. Intertempe ni estas en Esperantujo ne plu ekzotoj - oni alkutimiĝas ŝajne, ke ni kiel tute samranga fakorganizaĵo kontribuas nian parton al la movado. Oni vigle kunportis nian materialon (ĉefe Forumoj) kaj ni sukcesis gajni kelkajn novajn membrojn. Du raportistoj de „Varsovia vento" sendependa unu de la alia intervjuis kaj prezidanton Francis (297) kaj sekretarion/kasiston Rolf (188).

Ĉijare ni ne sukcesis prepari renkontiĝon kun loka geja organizaĵo en la UK-urbo, simple ĉar tio en Bialistoko ne ekzistas. Tamen, dank´ al Sebastian (650) kaj la reto, ni trovis en la portalo „Gayromeo" junan gejon Pjotr, kiu i. a. regas la anglan kaj la germanan. Kun li ni pasigis du interesajn vesperojn rigardante la urbon kaj vizitante restoracion.

Tuj antaŭ nia jarkunveno sekretario Rolf (188) kaj poste prezidanto Francis (297) estis intervjuitaj de ĵurnalisto laboranta por la brita gazeto The Times. Lia artikolo aperis 27-an de julio kaj estas rete ĉi tie legebla: http://tiny.cc/RjBs8. La raportisto informis siajn legantojn ĝenerale pri la lingvo kaj la UK en Bialistoko. Inter alie li skribis:

"La knabina kapelo estis deĉifrileto, kantanta allogajn popularajn kantojn en lingvo kaj strange rekonebla kaj tute fremda. Tamen, inter aro de amecaj ligiloj, estis kunveno de Gej-lesba asocio, kiu plene deĉifris la enigmon: Esperanto ne estas same tiel kiel estis." Kaj plue: „Eble unu de la plej ekskluzivemaj organizoj, la geja kaj lesba grupo – laŭnome "samseksaj amantoj"- havas 200 membrojn en 40 landoj, inkluzive tiujn, kie samseksamo estas kontraŭleĝa. "Ni havas membrojn en landoj kiel Kubo, Ĉinio kaj Irano," diris Francis Soghomonian, eksiĝanta prezidanto el Francio."Ni certigas al ili, ke ilia membriĝo estas sekreta. Tio estas ilia sola lingvo por interparolo kun aliaj gegejoj. En Irano estas tre rigora cenzurado. Ili povas utiligi Esperanton kiel sekretan lingvon por interkomunikado kun aliaj gegejoj ekster Irano."

Finfine la ĵurnalisto citas nian iaman LSG-prezidanton: "Esperanto estas bona ideo atendanta sian momenton," diris John Wells, emerita profesoro pri fonetiko en Universitata Kolegio Londona, prezidanto de Akademio de Esperanto. Ĝis tiam, diris li, necesas pacienco: "La nuntempa hegemonio de la angla ne povas daŭri, kaj la momento alvenos, kiam la mondo agnoskos la neceson por Esperanto. Nia tasko estas teni Esperanton en bonega stato."

*(el The Times trad. Arnold – 264)*
*Rolf (188)*

# Alan Turing: brila matematikisto kaj samseksemulo

Lanĉiĝis kampanjo lastatempe, por akiri oficialan rekonon, postmortan, de la komputila pioniro Alan Turing, brita matematikisto, kiu pasigis siajn plejgravajn jarojn ĉe la Universistato de Manĉestro, rekonata kiel unu el la fondintoj de la moderna informadiko. Sed ankaŭ akuzita kaj jure persekutita pro samseksamo, kio interrompis lian karieron. Jam batita pro tiuj okazaĵoj, li sinmortigis en 1954, 41-jaraĝa.

Nun, aro de admirantoj de tiu sciencisto pledas por ke la brita registaro faru "postmortan apologion". Laŭ la revuo Time Magazine li estis unu el la 100 plej gravaj homoj de la 20a jarcento. Li ankaŭ estis unu el la plej lertaj "kodo-rompistoj" dum la dua-mond-milita tempo (1939-1945), ano de la teamo kiu sukcesis malplekti la "Enigma"-kodon uzata de kod-maŝinoj sur la germanaj ŝipoj. Tial, en 1945 li honoriĝis kiel O.B.E. oficiro (Ordeno de la Brita Imperio), kaj poste iris al Manĉestro por kunlabori en la disvolvado de la komputilo "Mark 1". En 1952 oni akuzis lin je maldeco pro seksumado kun viro. Li evitis karceron per la akcepto submetiĝi al eksperimenta hormono celanta malpliigi seksan emon. Tamen, tio grave ĝenis lian karieron, kaj li



afliktegiĝis. Lian mortan korpon trovis purigisto en lia domo en 1954, apud venenita pomo. Nur en la jaro 1967 nuliĝis la leĝo kontraŭ samseksamaj agoj [en Britio]. Nun 500 homoj subskribis peton, por ke oni "rekonu la tragikajn konsekvencojn de antaŭjuĝo, kiu ĉesigis lian vivon kaj karieron". John Graham Cumming, brita komputilisto kiu lanĉis la kampanjon, diris: "Mi opinias ke la grandegan kontribuon de Alan Turing oni ne rekonis en Britio ĉar li mortis kvardekjaraĝa kaj preskaŭ certe pro tio ke li estis gejo. Tiu homo estis nacia trezoro kaj ni persekutis lin ĝis morto."

# Gej-edziĝo en Hindio plu problemas

Surekha kaj Neeru estis studentinoj kiam ili sin renkontis en Chandigarh antaŭ ok jaroj.



Julie ili fuĝis kaj edziniĝis en Haridwar. Tamen, kiam ili revenis, la familioj senheredigis ilin.

"Ni edziniĝis en Haridwar. Nun ni loĝas en luita apartamento," diras Surekha.

"Ni ne forlasos unu la alian. Ni provos resti kune por ĉiam. Niaj familioj diris, ke ni devas disiĝi por esti kun ili. Sed ni estas feliĉaj kune," diras Neeru Verma.

Neeru perdis siajn gepatrojn je frua aĝo kaj estis kreskigata de sia pligranda frato, kiu sentas honton pro ilia rilato.

"Tio estas eraro. La decido de la Alta Kortumo ankaŭ ne estas ĝusta. Ili devus diskuti tion kun ni. Ni ne estas pretaj akcepti ilin," diras Rohit Verma, frato de Neeru.

La batalon ĉe la kortumo ili eble venkos. Sed la batalo por gejaj rajtoj en niaj hejmoj necesos pli multajn jarojn ĝis ĝi finsolviĝos.


# En Britio lesbaninoj rajtas gepatri

La partnerinoj de lesbaninoj, kiuj generas infanojn danke al generigaj rimedoj, ekde septembro rajtas enregistriĝi kiel gepatroj de ĵus naskito, en Britio.

Ĝis tiam, la partnerino de patrino ne rajtis esti konsiderata gepatro (...gepatrino), sed per tiu ŝanĝiĝo en la registroj pri nasko kaj morto oni garantias samajn rajtojn al la lesbanaj paroj kiel al la geaj.

La enkondukitaj ŝanĝoj klarigas, ke la partnerinoj de patrinoj sen kontrakto de Civila Unuiĝo devas liveri al la naska kliniko skriban deklaron en kiu nomiĝas kiel generinto la partnerino. Tiele ĝuas la saman rajton ankaŭ la ne-geedziĝintaj paroj.

# Urugvajo avangarda en la GLAT-rajtoj



Tabaré Vazquez, antaŭa prezidento, kies registaro aprobis la leĝon.

La senato de Urugvajo aprobis la 9an de septembro, per 17 voĉoj el 23, la novan leĝon pri infanadopto, al kiu la Deputitaro, la alia parlamenta asembleo, donis sian aprobon kelkajn tagojn antaŭe, kiu permesas al la civile kuniĝintaj samseksaj paroj adopti infanojn. Kio ne eblas, ekzemple, en landoj kiaj Francio aŭ Germanio, tio igas Urugvajon sudamerika lando kun plej avangarda jura nivelo por la samseksaj paroj.

En la realo, la nova leĝo nenion diras pri la samseksemaj paroj, sed simple plivastigas la eblecojn adopti infanojn al la paroj kiuj civile sin kunigis per la t.n. “leĝo de konkuba kuniĝo”. Ĉar tiu leĝo enkomprenas ankaŭ la samseksajn parojn, tiuj fariĝas eblaj adoptantoj. La leĝo akiris la favoron kaj de la partio Frente Amplio (la reganta maldekstrula koalicio) kaj de la partio Partido Colorado, opozicia. La partio Partido Nacional, ankaŭ opozicia, voĉdonis kontraŭ. Do, vasta rezulto, frukto de Parlamento kiu ne lasis sin timigi de la premoj de la katolika eklezio, kiu laŭatendite energie kontraŭstaris la proponon.




La jura situacio de la samseksaj paroj povus pliboniĝi post la venko de la koalicio Frente Amplio en la politika balotado la pasintan novembron. La

senatanino Margarita Percovich anticipis en majo ke, se tio okazus, la koalicio proponus la geedziĝon inter personoj de sama sekso, tiel ĉesigante la nun ekzistantan diskriminacion (ekzemple, por akiri la rajtojn de la leĝo de konkuba kuniĝo necesas kvin-jara kunloĝado).

Ne estas nur tiuj la progresoj en la GLAT-rajtoj en Urugvajo. En majo oni metis finan punkton en la malpermeson al samseksemuloj eniri en la armeon, dum en decembro 2008 la Senato aprobis leĝon, kiu permesas la registran ŝanĝon de sekso por la transseksuloj, sen neceso de la kirurgia operacio, leĝo kiu baldaŭ povus aprobiĝi en la Deputita Asembleo.

## Italia homofobio kreskas (?)

La jaro 2009 vidis konsiderindan kreskon en la nombro de atakoj kaj atencoj kontraŭ GLAT-homoj en Italio. En ĵurnaloj kaj televido anonciĝis en marto agreso kontraŭ 30jara mens-handikapita viro en la urbocentro de Pordenone (nord-orienta italio), en majo kontraŭ du transseksulinoj per feraj stangoj en Florenco, en junio estis batita junulino kiu alkuris por defendi sian gejan amikon en la geje frekventata placo Bellini en Napolo, en aŭgusto 40jara duonfrenezulo ekstrem-destrulo vundis per rompita botelo junulon kisantan sian fianĉon ekstere de geja dancejo ĉe Gay Village en Romo, en septembro du paper-bomboj eksplodis en la t.n. “geja strato” en Romo.



Dino, la knabo vundita en Romo en aŭgusto de la viro nomata “Svastichella” (“Hokokruceto”), montras la kuracitan vundon en la ventro.

Tiuj estas nur kelkaj el la 8 murdoj, 65 agresoj, 8 raboj, 4 perfortoj inter studentoj, 7 damaĝoj, kiuj okazis dum la jaro (de januaro ĝis oktobro). Tio kondukis al serio de manifestacioj en multaj italaj urboj dum septembro, precipe noktaj torĉo-marŝoj, kiuj kulminis en granda nacia manifestacio en Romo la 10an de oktobro, kiu postulis de la parlamento akcelon de diskuto kaj aprobo de diversaj leĝoproponoj, precipe pri samseksa partnereco kaj pri pligravigo de homofobiaj agoj en la krima juro. La dua leĝopropono estis efektive diskutita en la




La torĉo-marŝo en Romo, 4 septembro 2009, ĉi tie antaŭ la monumento Vittoriale aŭ Patruja Altaro.

parlamento la 13an de oktobro, sed malaprobiĝis, kio rezultiĝis en granda skandalo sur ĉiuj amaskomunikiloj, ĝis eĉ akuzo flanke de Navi Pillay, Alta Komisiito de UN pri homaj rajtoj.

Restas demando: ĉu tiom nombraj okazaĵoj estas pruvo, ke en Italio kreskas homofobio, aŭ male kreskas ĝenerale en la socio la konsciiĝo pri tiuj krimoj, kio igas multajn denunci ilin, dum antaŭe plejparte tiujn okazaĵojn oni kaŝis pro timo aŭ honto?

# Foto pri geja vivokazo gajnas en la World Press Photo

*La aŭtoro estas juna itala fotografisto, Mattia Insolera, kiu en Barcelono ekkonis kaj lernis rakonti pri la geja mondo. Liajn fotojn oni publikigas tra la tuta mondo. La retejo Gay.it intervjuis lin*[1]*.*

Knabino rigardanta per petoleta okulo tra spegulo sian patron, kiu aranĝas sian kravaton, kaj klare fiera pro sia nova eleganta vestaĵeto baldaŭ elmontrota al la gastoj. Kio estas pli natura ol tio? Nu, se la knabino ankaŭ estas filino de alia viro, laŭleĝe, kaj tiuj du viroj estas sin pretigantaj por edziĝi en Barcelono post kiam en Kalifornio abrupte nuliĝis ilia antaŭa edziĝo, la foto fariĝas emblemo de civila batalo. Kaj ĝi gajnis la duan lokon en kategorio "ĉiutaga vivo" de World Press Photo 2009, la plej fama fotografa premio en la mondo.

La foto kaptas momenton de intimeco (montriĝas evidente banĉambro) kaj dolĉeco, kaj aparte efektas pro sia ludo per speguloj. Mattia Insolera, agentejo Grazia Neri, la juna itala fotografisto 31-jara kiu kaptis ĝin, estas fiera pro sia laboro kaj emociita pro tiu agnosko, aperinta post lia foriro el sia urbo Bologna antaŭ du jaroj.

"Kiam mi alvenis en Barcelono, mi intencis rakonti historiojn pri tiu lando, kiuj reliefigu ĝian socian energion, ĝian vivecon".

*Kiel vi komencis pritrakti pri gejoj?*

Mia unua projekto, naskita kadre de la fotoĵurnalisma kurso de la Aŭtonoma Universitato de Barcelono, celis koncentriĝi en la geja merkato. Cetere, tio ŝajnis al mi neŭtrala maniero pritrakti

[1] Traduko de la reta artikolo de Luca Tancredi Barone, aperinta la 9an de marto 2009 en www.gay.it.



La premiita foto de Mattia Insolera

socie rimarkindan temon: Italio, kun sia fermiteco kaj hipokrito, riskas malgajni monplenan kaj kunecan merkat-niĉon.

En la artaj urboj, kvankam subtera, iom da geja merkato estas.

Verdire, laŭ kion klarigis al mi Carlos de Cires , granda aktivulo kaj movanto de la geja turismo, mortinta en julio 2008, la rakontoj de samseksemaj turistoj en Italio, legeblaj en blogoj kaj specialaj retejoj, estas teruraj, pri diskriminaciitaj kaj atakitaj homoj. Ĉiuokaze, estas jam konate, ke la gejaj turistoj mezume elspezas ĉ. 30%-e pli ol la aliaj: ĝi estas ja malgranda niĉo, sed ne estas kredeble ke Italio povas permesi al si perdi tiom.

*Sed vi ne limigis vin je komercado.*

Tiu estis nur la unua paŝo. Granda temo, kiun mi sekvis kaj dokumentis, ege pli politika, estis la geja polico. Ĉi tie en Barcelono ekzistas gej-policana asocio kiu lastjare organizis la eŭropan kunvenon de ĉiuj gej-policanaj asocioj. Rakontante ĉion tion oni komprenas, kiel ĉi tie oni vivas alian staton de civilaj rajtoj kaj de la koncepto "inkluziva civitaneco". Poste venis la rakontado pri sporto kaj amuzado, pri Eurogames, unu plian fojon en tiu ĉi akceptema urbo, kaj pri Geja Cirko.

*Sed la privata dimensio pleje sukcesis.*

Jes ja. La historio de U.B. kaj Stassa tre multe plaĉis, oni eldonis ĝin en

Hispanio, Italio, Meksiko, Britio, Usono. Kaj unu el la dekdu fotoj de la raportaĵo gajnis premion, kiu estas revo por ĉiu fotografisto.

*La belo de tiu foto estas kompliceco kaj naiveco. Kvazaŭ diri: kio malbona estas en tio?*

Tiel estas. Alie estas ĝenerale paroli pri homaj rajtoj kaj libereco, alie estas vidi tion per siaj okuloj, aŭ per tiuj de la fotografisto. Nur per historio de certa paro, de vera knabineto, cetere tre fotinda, oni povas transdoni fortan mesaĝon. Kaj ĝi estas, ke en tiu ĉi lando *[Hispanio, n.d.l.r.]* la seksa elekto ne plu gravas, ke ĉiuj rajtas vivi laŭŝate. Ke por kreskigi infanon gravas kiu amas ĝin, kaj ne la sekso de la kreskiganto. Por granda parto de okcidentanaj legantoj (ni preteratentu aliajn) vidi bildon de du patroj kaj ĉefe de filino estas tre frapa. Eĉ por homoj plej afablaj: mi pruvis tion je mia propra sperto. Sufiĉas legi la komentojn skribitajn de la legantoj.

*Postkurante la gejojn en la trinkejoj, tra la stratoj, dum la diversaj manifestacioj, ĉu vi sentis diskriminaciata kiel malgejo?*

Tio neniam okazis al mi. Eĉ neniam tuŝita nur pro ŝerco. Tio ja ne ĝenas min, sed ofte inter malgejoj oni pedante aludas pri tio kio povas okazi meze de samseksemula grupo. Sed tamen okazas tio, kio okazas ĉie ajn: se vi volas ŝerci vi povas ŝerci, alie vi simple faras vian laboron. Certe, tio vekadis kelkan scivolemon, sed ĉiam kun plaĉa surpriza sento: "finfine ne nur ni parolas pri ni mem", simple dirite. Sed mia profesio estas enmiksiĝi en la vivon de aliuloj, devojiĝi de sia relo en la vivo. Alie oni malkovras nenion: se mi devas paroli pri montaro mi lernu pri skiado eĉ se mi ŝatas la maron.

*Vi tiom bone eniris en la gejan vivon, ke oni financis ankaŭ alian vian projekton.*

La urbo Girona kaj Inspai (urba centro pri la bildo de la urbo) donis al mi kaj al Catalina Gayà, ĵurnalistino kun kiu mi kunlaboras, stipendion por la projekto Rainbow Country, kies ideo estas priskribi la ĉiutagan vivon kaj la socian interagadon de la samseksaj gepatraj familioj de diversaj sociaj tavoloj kaj kun diversaj ecoj.

*Sed laŭ vi, kiuj estis la ŝlosilaj elementoj de via Barcelona sukceso?*

Precipe, neniu profetas en sia patrujo. Eĉ se Italio estus lando de ŝancoj, mi ne havus la netrompeblan rigardon de eksterlandano. Krome, strange Hispanio estas neokupita: de mia agentejo estas nur mi. Fine, kaj tio ne estas malgravaĵo, ĉi tie la ĵurnalaj redakcioj estas malpli singardemaj, ne estas kafkeskaj kasteloj. Por mi estis multe pli facile eldoni ĉi tie ol en Italio.

# Noticoj – mallonge

**Litovio.** Parlamento en Vilno malaprobis vetoon de la prezidento al leĝo kiu malpermesas "promocii samseksemon". Prezidento Valdas Adamkus vetois leĝon ne pro ĝia kontraŭgejeco, sed pro "tro ĝenerala difino de la »socia malutileco«". Tamen julie 2009 li finis sian oficperiodon kaj nova prezidentino, Dalia Grybauskaitė, komentis, ke la leĝo "ampleksas kontraŭgejecajn elementojn".

**Pollando.** Dum la 94-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis fine de julio 2009 en Bjalistoko, Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio diskutis novan kontraŭgejecan leĝon, kiu aperis en Litovio. TEĴA kontraŭis ĝin kaj subtenis la liberecon de la amaskomunikiloj en ĉiuj landoj.

**Germanio.** Ministrino pri Justeco, Brigitte Zyprier, subtenas atribuadon al samseksaj paroj de plena rajto por infanadopti. – Ekzistas nenia kaŭzo por trakti samseksemajn kunvivajn partnerojn malsame ol aliseksemajn – diris en Berlino ĉi tiu socialdemokrata politikistino. Ĉi tiun propozicion malakceptas kunreganta en Germanio kristan–demokrata partio CDU/CSU.

Laŭ enketoj, en Germanio nune 6600 infanoj estas edukitaj en samseksaj ligoj. Ĉirkaŭ 2200 el ili kreskas en registritaj partnerecoj.

**Israelo.** La 1-an de aŭgusto 2009 nekonataj farintoj atencis en Tel-Aviva "Cafe Noir" – loko por renkontiĝoj de junaj gejoj kaj lesbaninoj. Mortis du personoj – 16-jaraĝa knabino kaj 26-jaraĝa knabo; laŭ diversaj informoj, de 11 ĝis 15 personoj estis vunditaj.

**Belgio.** Ministro Pascal Smet, kiu patronas la iniciaton promociantan fordonadon de sango, mem ne povis fari tion. Rifuzis al li la Ruĝa Kruco, laŭ kiu "tiuj principoj regas en ĉiuj EU-ŝtatoj". Laŭ parolisto de la Ruĝa Krico, se gejoj rajtus fordoni la sangon, pli ofte okazus la infektoj.

**Skotlando.** Dank' al decido de la parlamento, samseksaj paroj povas adopti infanojn kiel kunligo. Pli frue ekzistis ebleco infanadopti, sed tiam oficiale nur unu el partner(in)oj estis oficiale gepatro (kuratoro).

**Francio.** Opozicio postulas eksiĝon de la ministro pri kulturo, Frederic Mitterrand, lige kun fakto el lia bibliografio el jaro 2005, kie li konfesas pagi pro seksumado al junaj knaboj en Tajlando. La afero okazis nur nun, ĉar Mitterrand varme defendis Roman Polański, akuzita pro seks-perforto al neplenaĝa knabino.

*Kompilis:Paweł (619)(http://eo.fiskot.info)*